nia voĉo

madrida esperanto-liceo oktobro 2023

## FORPASIS AUGUSTO CASQUERO

La 19an de Septembro forpasis en Valencio, post longa malsano, nia amiko Augusto Casquero, prezidanto de Madrida Esperanto-Liceo inter 1977 kaj 1984, kaj tre aktiva esperantisto en Madrido kaj aliaj lokoj dum multaj jaroj.



Li naskiĝis en Ekstremaduro, sed loĝis longtempe en Madrido, ĝis sia translokiĝo al Valencio. Li lernis Esperanton en 1969, kaj multe aktivis en nia grupo.

Augusto instruis Esperanton ne nur en Hispanio, sed ankaŭ en Slovakio, Pollando, Usono kaj Ĉinio. Li organizis multnombrajn renkontiĝojn kaj kongresojn, kaj interalie li prezidis la Lokan Kongresan Komitaton de la Universala Kongreso en Valencio (1993). Li estis prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio inter 2005 kaj 2008.

Augusto estis tre konata pro sia afableco, simpatio kaj ŝercemo. Tuj post la konigo de lia forpaso alvenis al HEF multaj agnoskoj kaj kondolencoj. Ankaŭ la madridaj samideanoj kondolencas lian edzinon Alicia, lian familion kaj liajn multajn amikojn en la tuta mondo.

Ni bedaŭras informi ankaŭ pri la forpaso en pasinta monato julio de nia ano Sergio Ramos. Tre simpatia homo, ni kondolencas lian familion kaj amikojn.

## REKOMENCIĜAS LA KURSOJ DE ESPERANTO

La grupoj de Madrido kaj Fuenlabrado anoncas la komencon de novaj kursoj de Esperanto por tiu ĉi akademia jaro. Oni nun malfermas la alvokon por varbi pri la kursoj, kiuj komenciĝos verŝajne post la hispana kongreso, do post la tria semajno de oktobro. Ĉiuj aliaj detaloj, kiel semajntago, horo kaj nivelo estos decidataj interkonsente kun la lernantoj, do bv. anonci vin antaŭe, kaj informu viajn konatojn kiuj povas esti interesataj. Skribu al la retadresoj madrid@esperanto.es (por Madrido) aŭ esperantoesdetodos@gmail.com (por Fuenlabrado)

La 7an de septembro malfermiĝis la ebleco enskribiĝi en nova eldono de la kursoj de Esperanto organizitaj de la Ŝtata Universitato por Neĉeesta Edukado de Hispanio (UNED), kun la kunlaboro de Hispana Esperanto-Federacio. Ni rememorigas ke ili estas instruataj rete, kun oficialaj instruistoj kaj konversad-helpantoj, kaj ili estas alireblaj ne nur el Hispanio, sed ankaŭ el multaj landoj el Eŭropo, Latinameriko kaj aliaj kontinentoj en kiuj UNED havas filiojn. Ĝi havigas oficialan diplomon de la Universitato, en du niveloj, A2 (baza en la kazo de Esperanto) kaj B1.

Vi povas aliri la gvidilon de la kurso en la retejo http://www.cuid.uned.es ("modalidad en línea"). Eblas enskribiĝi ĝis la 23a de oktobro. Bv atenti ke la anoj de Hispana Esperanto-Federacio ĝuas konsiderindan rabaton en la prezo.

## TRE BALDAŬ ALVENAS LA HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Kiel ni plurfoje informis, inter la 12a kaj 15a de oktobro okazos la Hispana Esperanto-Kongreso, en Sevilo. La informoj pri aliĝo, programo, gastigado kaj ceteraj detaloj troviĝas en la retejo: https://kongreso.esperanto.es/.

Oni atendas la ĉeeston de ĉ. 150 homoj, el dudeko da landoj.

Dum la 10a kaj 11a de oktobro okazos antaŭkongreso universitata, en la Fakultatoj pri Filologio kaj Psikologio de la Universitato de Sevilo, senpaga por la partoprenantoj en la kongreso. Detalojn konsultu en: https://kongreso.civiencia.io/SR2023/.

## VENONTAJ RENKONTIĜOJ

Itala samideanino Viviana vizitos nin meze de oktobro kaj gastos ĉe esperantistoj. Ŝi prelegos la lundon, 16an de oktobro, pri la temo: "Stereotipoj kaj antaŭjuĝoj kontraŭ Islamo", pri kiu ŝi fakas. Ni rendevuos en la sidejo de MEL ekde la 18,30.

Por la dimanĉo 22a de oktobro MEL proponas tuttagan ekskurson al la vilaĝo Navalagamella. Tie ni planas marŝadi interesan itineron "Pado de la muelejoj". Ĝian priskribon vi povas vidi en jena reta ligilo: https://sendasdeviaje.com/navalagamella-ruta-molinos/.




Por la transporto ni uzos privatajn aŭtojn. Do, la partoprenontoj bonvolu diri al la adreso de MEL aŭ al Manolo Parra ĉu oni disponas sidlokon en sia aŭto, ĉu oni bezonas lokon en alies.

Ankaŭ en tiu ĉi monato ni organizos la kutiman renkonton unuasabatan, ĉikaze la 7-an de Oktobro, denove en la kutima loko, la polpejo Pulpería O Miño, strato Idioma Esperanto, num. 2, de Madrido (metrohaltejo Alsacia, lineo 2).

## PLIAJ INFORMOJ KAJ RENKONTOJ

Ni denove renkontiĝas ĉiujn lundojn en la sidejo, ekde la 18,30 horo, por babili kaj praktiki la lingvon.

Por aliaj novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo Tŭitero (*Twitter*, nun *X*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com